# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:14 aprilo 3.**

Pezo: Word 40, PDF 310 KB, Sume 390 KB

## UEA atingis 4700 individuajn membrojn en 2023

Hodiaŭ (mar 24) aperis la aprila numero de revuo *Esperanto*, kiu enhavas la finan sumon de la membraro. Individuaj membroj kreskis kaj atingis 4700, kompare kun 4552 en la antaŭa jaro. Klare, por la nuna jaro, la celo de kvin mil individuaj membroj estas realisma celo. La Fondaĵo Canuto ege laboros kreskigi sian subtenon, sed la kresko venu el pagintaj membroj - la varia kotiztabelo ege kontribuas al tio! Laŭ vere kuraĝa elpaŝo, UEA akceptas membro-pagojn forte diferencigitajn laŭ pagipovo.

Kune ni paŝu al la kvinmilo!

**La defio:**

Pliaj 300 membroj en 2024!

**300**

**La celo:**

5000 membroj de UEA en 2024!

**5000**

## La eŭropaj elektoj venas kaj uzindas!

Klare, nia movado rilatas ĉefe al tiuj elektoj pere de la franca grupo de EDE: Eŭropo – Demokratio – Esperanto. Tiu grupo proponas tekston, al kiu SMG faris du modestajn aldonproponojn. En ĉiu kontakto kun la kandidatoj bonvolu aldoni la tekston en via lingvo, kiun vi trovas en: https://uea.org/vikio/Multlingvismo-esperanto

Jen la teksto en Esperanto:

‘Esperanto estas internacia lingvo, uzata jam dum kvin generacioj por egalrajtigaj rilatoj inter homoj de malsamaj lingvoj. Ĝi estas ege regula kaj do multe pli rapide lernebla ol aliaj lingvoj. Ĉar ĝia lernado tre rapidas, kaj ĉar pli ol 99% de ĝia vortaro similas al vortoj de aliaj lingvoj, ĝi faciligas lingvolernadon ĝenerale. Aliflanke ĝia gramatiko estas tute originala kun elementoj de multaj lingvo-familioj, ankaŭ aziaj kaj latin-amerikaj. Ĝi apartenas al neniu, kaj do povas aparteni al ĉiuj. Tiel ĝi kontribuos al Eŭropo pli multlingva, pli justa kaj pli efika.

Legu pri Esperanto en la angla Vikipedio: en.wikipedia.org/wiki/Esperanto

Lernu Esperanton: lernu.net

**SMG:** Mi proponas du modifetojn kaj aldoneton.

*Modifo*: Ĝi estas tute regula ➔ ĝi estas ege regula

*Modifo:* ĝia vortaro samas al vortoj ➔ ĝia vortaro similas al vortoj

*Aldono*: …de multaj lingvo-familioj, ankaŭ aziaj kaj latinamerikaj.

## La azia junularo kunvenos en Indonezio

Vi estas invititaj partopreni en la Kunveno de Sudorient-Azia Junularo (KUŜEJO) de la 14-a ĝis la 17-a de novembro 2024, kiu okazos en la belega urbo Jogjakarto, Indonezio. Pri la urbo vidu ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=1V_4-f5Ocy4 .

Ĉi tiu evento estos ne nur eblo renkonti novajn amikojn el ĉiuj kulturoj de sudorientazio, sed ankaŭ lerni, kreski kaj partopreni en sociaj iniciatoj. Atendu inspirajn prelegojn kaj diskutojn, amuzajn kaj historiajn ekskursojn.

**Kiel aliĝi: https://sites.google.com/view/ksj2024/%C4%89efpa%C4%9Do**

Atsusi Nisinaga, Estro de la Azia Komisiono.

## Kurso en ĉina universitato

La kurso de Esperanto ĉe la universitato iris glate. Partoprenis ĉirkaŭ 50 studentoj, venantaj el diversaj fakoj kaj kursoj, inkluzive de la angla, franca, hispana, portugala, rusa kaj korea. La studentoj estas junaj; en nur tri horoj, ili majstris la esencojn de prononcado kaj literumado. Mi esperas, ke ili starigos interŝanĝojn kun Esperanto-lernantoj de aliaj lernejoj post plibonigo de la lingvo-kapablo.

Venki, helpinstruisto, fujurungga@gmail.com

## Facile triteme

https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/virina-agado-en-benino-r419/

https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/kiu-estis-doktoro-ignaz-semmelweis-r418/

https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/balaibalano-la-444-jara%C4%9Da-pra-esperanto-r410/

Pri Semmelweis ni raportis en EKO 13. Jen ĝi en pli simpla formo.

## Togolanda aktiveco kun bona humuro

La tradicia kunveno de lomeaj esperantistoj. konata ankaŭ sub la nomo *babilmanĝo*, post dumonata paŭzo, rekomenciĝis kaj la unua renkontiĝo de la jaro ĵus okazis la 23-a de marto en la universitata centro *Saint Jean de Lomeo*. Entute 9 malnovaj geesperantistoj kaj 1 nova partoprenis. Longa raporto aperos iom pli poste.

Adje Adjévi



## Argentina kurso

Nomo: Nova kurso
Gvidantonomo kaj aldoninto: Ruben Sanchez
Loko: Neuquen, Argentino

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27627

## Plia kurso en Ĉinio

La elektebla kurso de Esperanto por la gestudentoj de scienco kaj tekniko de la Universitato de Zaozhuang. Lernolibro de Sun Minĝiao kaj prezentaĵo per *Powerpoint* de Anna Löwenstein. Instruas mi (en la ĉina) kaj asistas min Hirundo, la prezidantino de Ŝandong-a Esperanto-Asocio.

Alessandra Madella

## Benina junulinaro renkontas nian lingvon

Komence de marto 2024, okazis ĉe la porknabina Liceo de Lokossa, la unua kurskunveno kadre de la projekto pri virina agado fare de la NRO Infanoj Ĉirkaŭ Afriko. Sekve de la propagando aliĝis 74 knabinoj, el kiuj ĉeestis la kurson sesdek du. La kurso fokusiĝis pri la alfabeto. Sur tabulo kontraŭ la muro, estis skizita dukolumna tabelo. Unu kolumno entenis la 28 literojn kaj la alia estis rezervita por la prononc-maniero. Komence, mi prononcis, unu post la alia, ĉiun literon kaj la kursanaro komune ripetis poste.Tri provojn poste, deko da kursanoj, hazarde elektitaj, laŭvice, proksimiĝis al la tabulo kaj, per longa liniilo, montris la literojn, kiujn ili individue prononcis. La prononcmanieron mi skribis en la taŭga loko ĉe la fino de la kurso. Ververe, mi miris pri la rapida kresko de la nombro de aliĝantoj. Tion mi tute ne antaŭvidis sed nun devas elturniĝi.

Je la fino de la lernojaro, la kursaninoj ekzameniĝos. Kompreneble, la plej bonaj sukcesontoj ricevos premiojn. Donaco ĉiaspeca por helpi efektivigi la aferon estas bonvena. La buĝeto por la tuta afero estas € 700, el kiuj mi mem kontribuas € 200.

Monhelpo, laŭeble, de malavaruloj estas bonvena ĉe mia UEA-konto: gbla-e.

Kia ajn estos via kontribuo, ĝi utilos. Por pliaj informoj pri la agado, bonvolu rilati kun mi: Retadresoj:

latifougbadamassi@yahoo.fr; infanojcxirkauxafriko@gmail.com

## Ondo tra la mondo

Hodiaŭ estas festata la 80-jariĝo de **Gerrit Berveling**, kaj morgaŭ oni festos la 85-jariĝon de **Nicolino Rossi**– ni gratulas ĉi tiujn Esperantajn verkistojn kaj deziras al ili bonan sanon kaj novajn verkojn! La listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por aprilo 2024, kompilita de Aleksander Korĵenkov, estas legebla en *La Ondo de Esperanto* — https://sezonoj.ru/2024/04/aprilo-8/

## Freŝa novaĵo – plia AMO-seminario anoncita!

Hieraŭ alvenis bonvena novaĵo. La Amerika Komisiono de UEA laboras por riĉigi la AMO-programon. La 109-a AMO-seminario okazos en Havano, Kubo, de la 15-a ĝis la 17-a de aprilo. La temo estos la evoluigo de la movado en Kubo kaj Ameriko. Sekve, la AMO-seminario en Pollando maje ricevos la numeron AMO 110.

========= vortoj: 1080 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj dek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.